Günter Grass

Mut jeweils

Ich kopfüber ich bin unter den Kopf

Dann verschwindet mein Kopf zwischen den Schenkeln Gleiten Gleiten Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich verliere, verschwinde, verschwinde Gleiten Gleiten Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle

Kopfüber ich bin unter Kopfüber Gleiten ich falle Gleiten Gleiten Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle Gleiten ich falle

knabino, estas senkuglaj kartoĉoj. Ek, mi diras, ek!”

Tiam mi levis obeeme la revolveron, faris tion sentime kaj aspektis, kiel ili raportis al mi poste, “bela kiel anĝelo”. Staris do kaj premis kvin fojojn por ebligi la akustikan mezuradon. Kaj jen, ĉio sukcesis. La grumblovoĉo en la mallumo apartenis al Hans Scharoun, kiun mi ekde tiam tiom adoris kiom antaŭe mian instruiston de fluto. Tial – eble ankaŭ sekvante mian internan voĉon – mi forlasis la muzikon kaj studas nun entuziasme arkitekturon. Sed de tempo al tempo – ĉar nun mi estas sen stipendio – mi daŭre asistas kiel vestogardistino. Kaj mi spertas de koncerto al koncerto, kiel muziko kaj arkitekturo komplementas unu la alian, aparte tiam, kiam ŝipkonstruisto samtempe malliberigas kaj liberigas la muzikon.

Tradukis el la germana **Wolfgang Kirschstein**

Notoj

Nicolet, Aurèle (1926–). Svisa flutisto, solflutisto en la Berlina filharmonia orkestro (1950–1959), profesoro en la Berlina muzika akademio (1952–1965).

Karajan, Herbert von (1908–1989). Aŭstria dirigento, gvidanto de la Berlina filharmonia orkestro dum 35 jaroj (1954–1989).

Posener, Julius (1904–1996). Germania judo, arkitekto, fakulo pri historio de arkitekturo. Forlasinte Germanion en 1933, li revenis en 1961 kaj laboris kiel profesoro en la Berlina arta universitato ĝis 1971.

Scharoun, Hans (1893–1972). Germana arkitekto, projektinto de la Berlina filharmonio, finkonstruita en 1963.

1991

“Mortintoj ne videblas. Nur ŝancelaj koordinatoj kaj trafoj, laŭdire celprecize. Ĉio iras kvazaŭ infanludo”.

“Kompreneble, ĉar CNN havas la televidrajtojn de tiu milito kaj jam nun tiujn por la venonta kaj postvenonta”.

“Sed brulantaj oleokampoj videblas”.

“Ĉar temas pri oleo, nur pri oleo”.

“Tion scias eĉ la idetoj, ĉie surstate. Tutaj lernejoj estas malplenaj kaj survoje, plej ofte sen instruistoj, en Hamburgo, Berlino, Hanovro…”

“Eĉ en Schwerin kaj Rostock. Kaj kun kandeloj, ĉar antaŭ ĉirkaŭ du jaroj ĉie…”

“… dum ni ankoraŭ babilaĉas pri la sesdek-oka jam, kiel ni tiam rigorege kontraŭ la milito en Vjetnamio, kontraŭ Napalmo kaj kaj kaj…”

“… sed hodiaŭ ne kapablas levi la pugon dum ekstere la infanoj…”

“Ne kompareblas. Ni havis almenaŭ perspektivon kaj io kiel revolucio koncepto dum nur kun kandeloj…”

“Sed kompari Saddam kun Hitlero, tio eblas, ĉu? Ambaŭ sur unu denominatoro kaj tuj ĉiuj scias, kio estas bona kaj kio malbona”.

“Nu, tio estis intencita metafore, sed intertrakti, pli longe oni devintus intertrakti kaj per ekonomia bojkoto premi kiel en Sudafriko anstataŭ milite…”

“Kia milito, do? La prezento, kiun bone aranĝis CNN kun Pentagono, kaj kiun nun spertas la norma uzanto sur la palvitraĵo aspektas kiel artfajraĵo, speciale aranĝita por la sidĉambro. Tutpure, neniuj mortintoj. Vi vidas kvazaŭ sciencfikciaĵon kaj mordetas salitan kukaĵon samtempe”.

“Sed la brulantajn oleokampojn oni vidas kaj bomboj falantaj sur Israelo, tiel ke la homoj nun en la kelo kun gasmaskoj…”

“Kaj kiu dum multaj jaroj armis Saddam-on kontraŭ Irano? Ekzakte, usonanoj kaj francoj…”

“… kaj germanaj firmaoj. Jen, longa listo, kiu liveris kion: abunde da altkvalitaĵoj, rakedakcesoraĵoj, kompletaj venenkuirejoj kun receptoj…”

“… tial eĉ tiu Biermann, kiun mi ĉiam supozis pacifisto, favoras la militon. Li diras eĉ…”

“Nenion li diras, sed denuncas simple ĉiujn, kiuj ne estas samdirektaj kun li…”

“kaj la infanojn kun la kandeloj, kiuj estas por la paco, li nomas ploraĉulinoj…”

“Ĉar tiuj idetoj estas sen socia celo, sen perspektivo, sen argumentoj, dum ni tiam…”

“… nu *Nenio sango kontraŭ oleo* jam diras ion…”

“Sed ne sufiĉe. Kiam ni kontraŭ la vjetnama milito…”

“…nu, *Ho Ho Ho Ĉi Minh!* ankaŭ ne estis frapa argumento …”

“Ĉiukaze nun estas la infanoj sur stratoj kaj placoj. Nun ankaŭ en Munkeno, Stuttgart. Pli ol kvin mil. Eĉ el infanvartejo ili partoprenas. Faras silentajn marŝojn inter kriegaj minutoj. *Mi havas timon! Mi havas timon!* — ili vokas. Tio neniam okazis antaŭe en Germanio, ke iu senkaŝe konfesas… Laŭ mia opinio…”

“Opinioj estas merdo! Rigardu tiujn idetojn. Sube Adidas, supre Armani. Dorlotitaj infanaĉoj, kiuj nun timas pri siaj ŝikaj vestaĵoj, dum ni en la sesdek-oka kaj poste kiam temis pri Okcidenta Trajektorio kaj eĉ pli poste kontraŭ Pershing II en Mutlangen kaj aliloke… Estis vere rigore tiam! Kaj nun alŝancelas tiuj idetoj kun kandeloj…”

“Kaj do? Ĉu ne komenciĝis tiele en Lepsiko? Mi estis tie, kiam ni ĉiulunde pace ekde la Nikolaopreĝejo. Ĉiulunde, jes ja, ĝis tiuj superuloj ektremis…”

“Ne eblas kompari kun hodiaŭ”.

“Sed Hitlero kaj Saddam. Ambaŭ sur unu poŝtmarko. Tio eblas, ĉu?”

“Ĉiukaze brulas oleokampoj…”

“Kaj en Bagdado tuta bunkro de civiluloj…”

“Ĉe CNN ja estas tute alia filmo…”

“Komprenu jam. Tio estas estonteco. Jam antaŭ la milito ili aŭkcias la televidrajtojn kontraŭ plej alta oferto…”

“Tion vi povas jam anticipe produkti, ĉar la sekva milito venos certe. Aliloke aŭ denove ĉe la Golfo.”

“En Balkano kontraŭ serboj kaj kroatoj certe ne…”

“Nur kie estas oleo…”

“Mortintoj ankaŭ tiam ne aperos…”

“Kaj timon, veran timon spertas nur la infanoj, nur…”

Tradukis el la germana **Wolfgang Kirschstein**

La supraj eroj aperis en *La Ondo de Esperanto*: 1999, №11 (61); 2000, №8–9 (70–71); 2004, №2 (112); 2005, №3 (125); 2006, №1 (135); 2007, №2 (148); 2008, №1 (159); 2009, №1 (171); 2010, №1 (183); 2011, №1 (195); 2012, №1 (207); 2013, №3 (221); 2014, №2 (232); 2015, №3 (245).